

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 2 2015

Ĵaŭdon la 26an de marto

63a jaro

Kalendaro

Atentu: ĉiuj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

Mardo la 7 a de aprilo (sem. 15) – *tirsdag*

Oksfordo – klasismo kaj elitismo en la hodiaŭa Britio. Vidar S. studas la araban kaj la persan tie.

Oxford – klasisme og elitisme i dagens Storbritannia. Vidar S. studerer arabisk og persisk der.

Lundo la 20a de aprilo (sem. 17) – *mandag*

Douwe kaj Leif Arne vizitis Kostarikon dum du monatoj por labori biene pri permakulturo. Kostariko estas la plej supra lando en la "Happy Planet Index".

Leif Arne kaj Douwe var to måneder i Costa Rica, øverste land på "Happy Planet Index", og arbeidet på permakulturgårder.

Mardo la 5a de majo (sem. 19) – *tirsdag*

Tradukekzerco. Daŭrigo de la laboro 3. feb. Ni traktos malnetan tradukon pri tradiciaj metioj, diskutante malfacilajn vortojn.

Oversettelsesoppgave. Fortsettelse av arbeidet 3. feb. Vi bearbejder en grovoversettelse om "små håndverksfag", med mange problemord.

Eksterordinara ĝenerala kunveno, vidu la 3an paĝon, malsupre.

Ekstraordinær generalforsamling, se den 3. siden, nesten nederst.

Lundo la 18a de majo (sem. 21) – *mandag*

Matias: spertoj pri lingva kafejo kaj aliaj interesaĵoj en Helsinko.

Matias: erfaringer med språkkafé og annet spennende i Helsinki.

Mardo la 2a de junio (sem. 23) – *tirsdag*

Diskuto de proponoj traktotaj en la landa kunveno.

Diskusjon om forslag som skal behandles på landsmøtet.

Lundo la 15a de junio (sem. 25) – *mandag*

Ĉeestintoj raportos pri la Landa Kongreso. + Interlingvistika temo.

Deltakerne rapporterer fra Landsmøtet. Interlingvistikk, se siste side

OKAZIS

Volapük: efemera florado (19. 1)

En nia serio pri interlingvistiko ni traktis volapük. Ĝi estis la unua planlingvo vaste uzata kaj la unua bazita sur libera uzado de afiksoj. Ni komparis la cirkonstancojn ĉirkaŭ la lanĉo kaj plua vivo de Esperanto kaj volapük, kaj ankaŭ trajtojn de la du lingvoj mem. Volapük estis celita unuavice por skriba kaj telegrama uzado, kaj montriĝis en la 3a kongreso en 1889 ke pro la nereconeble de la vortoj ĝi estis tro malfacila por ĝenerala buŝa uzado. La reformadon subfosis aŭtokrata sinteno de Schleyer, kaj la volapuka movado disfalis. Jam en 1888 la klubo de Nürnberg transiris al la ĵus lanĉita kaj pli facila Esperanto. Ĉu la mallonga florado de volapük stimulis aŭ malhelpis la disvastigon de Esperanto estas diskuteble.

Tradukaj defioj (3. 2)

Tradukekzerco. Kjell Peder, kiu laboras en muzeo en Skedsmo, trovis broŝuron pri tradiciaj norvegaj metioj, kiun li proponas traduki por afiŝi en la reto. La lingvaj defioj multas, sed akademiano Otto trovis solvojn. Ne ĉiam eblas redoni kunmetaĵon unuvorte: *bnadtilvirker* devas esti 'faristo de popolaj kostumoj'. Sed ankaŭ ne ĉiam necesas centprocenta precizeco: 'vitrometiisto' povas post la unua apero mallongiĝi al 'vitristo' aŭ 'metiisto', laŭ la kunteksto.

E-o k la vizio de la filozofoj (16.2)

Laŭ Federico Gobbo (Revuo *Esperanto* decembra) la tago en 1629 kiam Kartezio leteris pri sia ideo pri "perfekta" lingvo, estis la bapto de interlingvistiko, kaj tiu intuicio grandaparta realiĝis per Esperanto. Kvankam Zamenhof ne celis ian perfektecon por Esperanto, Gobbo kaj aliaj aŭtoroj kredas konstati ke ĝi realigas la vizion de la filozofoj. Ni trovis ekzemplojn de esprimoj en Esperanto kie ĝi estas pli preciza ol aliaj lingvoj, sed ankaŭ ekzemplojn de la malo. Troa precizeco povas esti ĝena por la praktika uzado.

Kiel helpi E.on en Afriko? (16.3)

De tempo al tempo ni ricevas petojn de esperantistoj en Afriko aŭ aliaj triamondaj regionoj pri helpo financi ilian E-agadon, aŭ renkonti bazajn bezonojn, foje ankaŭ en kriza situacio (inundo, milito). Ni povas ekz-e plusendi tiajn petojn al UEA (Konto Afriko, Konto Espero, k.a.) aŭ mem iom kontribui. Aŭ starigi interretejon kaj afiŝi tie katalogon da ricevitaj petoj.

Sed anstataŭ nur donaci, pli bone estus starigi ian evoluigan kuran agadon. Ĝi povos baziĝi sur uzado de skajpa kontakto, se ambaŭ nur havas komputilon. Ĉu per tio la sudlanda entuziasmo eĉ povus redoni al ni en la nordo la elanon kiu mankas al ni lastatempe?

Raporto pri la Jarkunveno / Årsmøtet 3. marto

Partoprenis 5 (kvin) membroj:

Jarraporto 2014: Ni faris diversajn korektetojn kaj aldonetojn al la versio dissendita retroŝte 23. februaro. Ĉefaj aldonoj:

i) sub "informbudoj": klarigo pri *Iqra*-tendo en la Mela-festivalo: Tie staris informbudoj de diversaj organizoj. *Iqra* (arabe) = scio, leg(aĵ)o.

ii) sub "Klubprogramoj": indiko de la enkondukintoj de la kunven-programoj.

iii) sub "luigo": mencio de tio ke la klientoj de "Kulturcentro Haugen" povis rigardi la esperantaĵojn en la ejo.

Aprobiĝis la jarraporto kun la akceptitaj ŝanĝoj .

La **jarkalkulon 2014** prezentis la kasisto, Harald Rygg.

Ni atendas de la kasisto de NEL ekzaktan membroliston kun kalkulo de la kotiza pago al la klubo (25 % de la membrokotizoj al NEL).

La kalkulo aprobiĝis, kun rezervo pri ĝustigo de la telefonelspezoj* kaj la membronombro – kondiĉe ke la revizoro ne havos rimarkigojn.

Elektoj

La estraro: Ni reelektis la jenajn:

Prezidanto: Kjell Peder Hoff; sek.: Douglas Draper; kasisto: Harald Rygg

Aldone: nova estrarano: Matias Jentoft

Anstataŭantoj: neniuj kandidatoj trovitaj.

Revizoro: Terje Meier (reelekto. kondiĉe ke li akceptos)

Ni kunvokas formalan eksterordinaran ĝeneralan kunvenon mardon la 5an de majo por elekti anstataŭantojn de la estraro [ankoraŭ mankas unu kandidato] kaj reprezentanton, kun anstataŭanto, en la domkomisiono.

*Poste ni ricevis klarigon de la kasisto de NEL pri la elspezoj por interreto kaj telefono (kiujn la klubo dividas egale kun NEL). La monata kotizo por interreto reduktiĝis en novembro 2013 de 299 kr al 159. Kaj por telefono ni pagas ekde julio 2013 nur por la (tre malmultaj) vokoj, neniun konstantan monatan kotizon.

Sekve de tio ni poste pagis por telefono kaj interreto, por 2013 kaj 2014, 3440 kr. Tio estas duono de la tuto: La alian duonon pagas NEL.

Avsanning: Styret mottar ikke honorar for arbeidet sitt

I en av meldingene som ble sendt ut før årsmøtet sto det at

Størrelsen på honorar og betaling for det arbeidet som gjøres og møter som holdes kan det nye styret selv bestemme.

Det har ikke vært praktisert noen slik ordning, i hvert fall ikke de siste 50 årene. Og skulle man ville innføre noe slikt, er det årsmøtet, ikke styret selv, som vedtar det og bestemmer beløpet.

Malkonfirmo de la aludo en mesaĝo dissendita antaŭ la jarkunveno:

La estraro ne ricevas ian honorarion pro sia laboro por la klubo.

Interlingvistiko

En nia kluba kunveno 15.6 ni refoje diskutos pri interlingvistikaj temoj, surbaze de la artikoloj de Federico Gobbo en Revuo *Esperanto*.

La lastaj aperis en la numeroj februara, marta kaj aprila respektive:

7. La du Lazaroj: du vivoj, du lingvoj (pri la revivigo de la hebrea)
(vd. ankaŭ la artikolon de Vidar Skretting en *IND* en *N.E-isto* 2)
 8. Kial tiom da latinidaj planlingvoj?
 9. Planlingvoj inter leksikografio kaj terminologio
-

Info-budoj en foiroj?

Info-budoj en foiroj kaj konferencoj donas bonan sed maloftan okazon renkonti la publikon – precipe junulojn – kaj informi pri Esperanto. Ofte jun(et)aj homoj tute ne aŭdis pri ĝi, kaj ne imagas ke tia lingvo povas ekzisti kaj esti uzata.

Sed tiaj konferencoj kaj foiroj ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en biblioteko. **Se vi scias / aŭdos** pri tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), bv. sciigi tion al ni.

Viktig: *Si fra om du vet om en messe eller festival e.l. hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling.*

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94

Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 6 al Sinsen.

* inng. Schouterrassen. www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).